

**INTERNACIA**

**JURA**

**REVUO**

**B·U·D·A·P·E·S·T**



## KOSMA SPACO KAJ JURO

Grandaj teknikaj akiraĵoj de nia erao, la esplorado de kosma spaco ne nur natursciencajn kaj teknikajn problemojn solvendajn donas en nian intereson. La konkero de kosma spaco havas ankaŭ juran, politikan rilatojn, kiuj kondukis al estigo de kurioze interesa, nova branĉo de la internacia juro, al juro de kosma spaco.

K o s m a s p a c o estas parto de l'universo, kiu metas sin ekster la atmosferon de la Terglobo. La dimensio de la atmosfero precize ne estas konata, probable ĝi etendiĝas ĉ. 3 000 km-jn. Tion ni dividas en du tavolojn: 1./ interna atmosfero, kiu estas alte ĝis 80 km-jn, kaj 2./ ekstera tavolo.

Unue la internan atmosferon ekkonis la homaro. En la plej freŝa tempo /speciale en Sovetunio/ per helpo de artefaritaj satelitoj kaj raketoj, perfidindajn konojn havigas la scienco ĉu pri la interna, ĉu pri la ekstera atmosferoj. Ni diferencigas plurajn tavolojn laŭ sia propreco. La tavoloj de la interna atmosfero estas 1./ troposfero, ĝi ampleksas ĉ. ĝis 12 km-j. Tio determinas la veteron kaj estas scenejo de gravaj fenomenoj de la vetero /nubaro, pluvaĵo/, 2./ statosfero estas parto inter 12-80 km-j de la atmosfero. Ĝi estas dividibla laŭ sia materialo kaj temperaturo. Ĝi signife efikas al la formiĝo de surtera vetero.

Oni klasigas la eksteran atmosferon jene: a./ ionosfero aŭ termosfero inter 80-2000 km-j, kiu entenas elektrajn tavolojn, kaj b./ eksosfero, kiu ampleksas trans 2 000 km-jn, estante maldensa aertavolo kaj estas transiro al la kosmo. Krom nia Terglobo, ankaŭ aliaj planedoj havas atmosferon, sed ilia konsisto kaj denso esence diverĝas de Terglobo /p.e. Marso, Venuso, Jupitero kaj Luno/.

J u r o estas tuto de reguloj pri sinteno kaj en nia temo koncernas al la kosma spaco.

Subjekto de la juro estas tiu persono, kiu povas partopreni, aŭ fakte partoprenas en iu interrilato. Krome li havas rajton kaj estas ŝargita de devigitecoj. Subjektoj de la juro povas esti fizika aŭ jura personoj kaj ankaŭ mem la ŝtato.

Subjektoj de certaj interrilatoj povas esti nur fizikaj personoj: p.e. jura persono ne povas esti subjekto de familia interrilato.

La objekto de la juro -do, de la jura interrilato estas tio sur kiu mem la jura interrilato direktiĝas. Do, la jura interrilato povas direktiĝi al iu objekto aŭ afero, aŭ sinteno. Io povas esti objektetosa aŭ ne-objektetosa.

### I.

a./ La homo, eble dum milionoj da jaroj, de sia esto, konkeris la teron kaj la akvojn. Nia kelkmiljaraj historiaj konoj prezentis la lukton kun fortoj de la naturo, kaj senĉesan ĉenon de kuraga klarigo pri la leĝo de naturo. La konkero de aero, ne pli ol 180 jarojn bezonis de la historio de nia civilizacio.

La balono de M o n t g o l f i e r en 1783 suprenleviĝis unuafoje kaj la bioplano de fratoj W r i g h t post unu kaj duonjarcento, en 1903. La kapturnorapida evoluo de la tekniko, dum sesdek jaroj ebligis, ke en la konkero de vertikala spaco -aera spaco- ni alvenu ĝis sojlo de la kosmo kaj homfaritaj me-

kanismo adaptiĝu kiel artefarita planedo en nia Sunsistemo. Certe nia generacio estos atestanto de kuraĝa kosmonaŭto en disitrikto de internaj planedoj de Luno kaj Sunsistemo. - La 4-a de Oktobro de 1957 estas dato de la suprenpafo de Sputniko No 1., kiu malfermis novan epokon de la teknika civilizacio. Tiun jam ni volonte nomas krom la epoko de l'atomo, ankaŭ la eraon de kosmo.

b./ La navigacio en kosma spaco starigas ne nur teknikajn taskojn por la scienco, sed ankaŭ politikan, ekonomian kaj juran. Pri la konkero de kosma spaco hodiaŭ ni apenaŭ povas paroli, sed la rezultoj en navigo de kosma spaco urĝas la aranĝon de interŝtataj rilatoj.

Unu specifo de la internacia juro estas, ke siajn regulojn faras mem la ŝtatoj, kiuj el siaj interŝtataj rilatoj originigas rajtojn, kaj surhavigas devigitecojn. La internacia juro ne formas relative ferman sistemon, kiel la interna teza juro de la ŝtato mem. La internacia juro de kosma spaco estas nova, dum formiĝa sfero de la internacia juro. - La pezocentro de juraj problemoj pri kosma spaco, krom la teoria fundamentado, sin bazas sur la internaciaj rilatoj juraj de paca koegzisto.

Kroman ellaboraĵon bezonus la konigo de biologia kaj fizika fundamentoj de la esploro de kosma spaco.

## II.

a./ Scienca kultivo de la juro de kosma spaco datumas en tiu tempo, kiam ankaŭ mem la astronautiko estis en sia teoria plano. Hodiaŭa doĵeno de soveta literaturo pri juro de kosma spaco Akademiano E. A. K o r o v i n, en 1934, sur la paĝoj de franca revuo "Revue Général de Droit International Public" okupis sin pri internaciaj juraj problemoj rilate al konkero de plej supera atmosfero. Liaj juraj teorioj ankaŭ hodiaŭ estas aktuale pravaj. Alia soveta aŭtoro V. A. Z a r z a r, pritraktadis en sia verko pri internacia juro de aero en 1927, la supran limon de suvereneco en la vertikala aero. - Specialan lokon okupas en la historio de scienco pri juro de kosma spaco, ĉeĥoslovaka advokato Vladimir M a n d l /Plzen/ en 1932, kiu akcentis, ke la surbazigo de principa fundamento de astronautiko - navigo en kosma spaco - estas pli ol nura preparo. Krome, li konvinke asertis, ke la homo fakte konkeros la kosman spacon. - En komenco de jaroj 1950-a komenciĝis la riĉa procezo de literaturo pri juro de kosma spaco. Speciale la usonaj John C o o p e r kaj Oscar S c h a c h t e r, okcidentgermanaj Alex M e y e r kaj Welf Heinrich Prinz von H a n n o v e r, krome la angla C. F. S. H o r s f o r d havas la meriton por mencii. Per sia scienca-organiza agado elstaris la usona Andrew G. H a l e y. - La suprenpafo de artefaritaj satelitoj en kadro de Internacia Geofizika Jaro, poste la sukcesoj de soveta sputniko kaj serioj de usona "Explorer" ege igis la intereson al la juro de kosma spaco. La publikaĵoj pri juraj problemoj de la kosma spaco hodiaŭ jam tiom amasiĝis, en la organoj de jursiprudenco kaj de tagĵurnaloj, ke ĝia trarigardo estas absolute ne-ebila.

b./ Post la komenca malkompreniĝo kaj neglekto de la juro de kosma spaco, hodiaŭ ĝi jam estas modo. Estas preskaŭ amaso da juristoj, kiuj okupas sin pri tiu ĉi sfero. Inter ili bulgara, argentina, aŭstra, belga, brazila, franca, usona, soveta, ĉeĥoslovaka, pola, jugoslava, hungara k.a. juristoj estas troveblaj.

Por studadi kaj esplori la problemojn pri juro de kosma spaco, estis

starigitaj plure da internaciaj kaj ŝtataj sciencaj institutoj, sociaj organizoj. Krome tiuj ĉe universitatoj de okcident-germana Kolonjo, ĉe kanada Montreal kaj usona advokata organizo kaj ĉe Soveta Scienca Akademio.

Al evoluo de la scienco grave kontribuis ankaŭ diversaj sciencaj organizaĵoj internaciaj. Nome la Internacia Jura Asocio, la Internacia Astronaŭta Federacio kaj en Internacia Instituto Por Juro De Kosma Spaco. Iliaj enketoj, debatoj, konferencoj kaj pridiskutoj -kolokvio- estis gravaj eventoj kaj ties materialo riĉigas la literaturon pri juro de kosma spaco.

c./ La esprimo de la juro de kosma spaco koncernas la kosman spacon kaj kun ĝi interrilitan agadon. Estas interese, ke la internacia jura termino ne estas unueca. En la r u s a fakliteraturo estas trovebla "kosma spaco" kaj ankaŭ "interplaneda spaco". En la a n g l a prijura literaturo oni uzas alterne "ekstera spaco", "interplaneda spaco", "interastra spaco" aŭ nur simple "spaco". En la f r a n c a terminaro ĝenerale kiel antaŭ estis ofta la termino "ekster-atmosfera spaco". La g e r m a n a fakliteraturo preskaŭ ekskluzive uzas la terminon "Mondspaco". En la h u n g a r a fakliteraturo enkondukigis la esprimon "kosma spaco".

Same al la interŝanĝo de termino, varias ankaŭ la esprimo pri ties juro, tiel "juro de kosmo", "juro de interplanedo", "juro de kosma spaco", "juro de astronautiko" ktp.

Estas varia la determino pri enhavo de la kosma spaco. Laŭ la hungara starpunkto "la juro de kosma spaco estas tuto de tiuj juroreguloj, kiuj reglamantas la internan ŝtatan kaj interŝtatan rilatojn -estigintajn- kun la uzo de kosma spaco kaj planedoj, krome la efikojn de juroj de la personoj de tiu agado". Do, tiel la interne ŝtatan juroregulojn: ŝtatjura, ŝtatadministracia, civiljura kaj kriminala, internacia civiljura, krome la esploro kaj uzo de kosma spaco: meteorologio, komunikado ktp. La internacia juro de kosma spaco apartenas al la internacia juro publika.

Estas menciinde, ke ne estas agado de kosma spaco, mem la suprenpafo de balistikaj raketoj.

La subjektoj de la juro de kosma spaco estas nur ŝtatoj kaj povas esti ankaŭ kelkaj -naturaj kaj juraj- personoj en ĝia interna, ŝtata parto.

d./ Ĉu estas nova jurbranco mem la juro de kosma spaco? Estas fakto, ke la reguligo de agado kaj uzado de kosma spaco donas tiajn specialajn taskojn, kiujn per tradiciaj metodoj oni ne povas solvi. Sed tiuj ne havas pravon, kiuj volas el la menciita problemo aserti la memstarecon de la juro de kosma spaco. Prave, ĝi estas parto de la internacia juro.

Tiel ĝiaj fontoj estas a./ la internaciaj kontraktoj /p.e. decidoj de Ĝenerala Asembleo de UN/, b./ la internacia kutimojuro /p.e. longdaŭra praktiko kaj la ĝeneraleco de la apliko/. Al la fontoj apartenas ankaŭ la internaj reguloj de la ŝtato, kiuj estas rilataj al agado en kosma spaco. Usono en 1951 kreis la leĝon pri kosma spaco. Sed ĝi havas nur administracian karakteron de la juroregulo. c./ ĝenerala juroprincipoj.

### III.

a./ Pri la suvereneco en aero ni devas menci la jenon. Antaŭ la invento de aviado, la aero estis rilata nur kun la civila juro. Je ŝanĝo de la kuranta

jarcento formiĝis diversaj principoj de la aera spaco. Tiel 1./ "libera aero", laŭ kiu la aera spaco ne estas sub potenco de iu ŝtato, 2./ "aera suvereneco", kiu rekonis la suverencon de iu ŝtato mem super sia aera spaco. 3./ "teorio de zono", kiu analogie de ĉeborda maro kaj publika maro -komuna maro- oni volis dividi la aeran spacon al pluraj tavoloj. - Post la unua mondmilito en 1919 en Paris subskribita unua plurflanka kontrakto internacia pri aero bazis sin sur la principo de punkto 2./ En posta tempo faritaj kelke da kontraktoj akceptas saman principon.

b./ La teritorio de la ŝtato, al kiu apartenas ankaŭ la aerspaco, estas limita parto de la Terglobo, kiu estas sub ekskluziva potenco de iu ŝtato. Jen estas la "teritoria suvereneco". El ties enhavo sekvas, ke A./ ĉiu ŝtato mem si reguligas la uzadon de lia aerspaco egale por sia kaj fremda aviadiloj, B./ ĉiu ŝtato povas limiti la liberecon de la aviado sur sia teritorio per determino de linioj, per preskribo de aviada alteco kaj indiko de malfermaj zonoj, C./ ĉiu ŝtato povas fermi sian aerspaco de antaŭ la aviado, D./ ĉiu ŝtato povas malpermesi la fotadon kaj filmadon ktp, E./ kiu ne havas permeson por aviado, tiun aviadilon ĝi povas devigi al alteriĝo, F./ senpilota aviadilo, same nur per anticipa permeso, povas aviaditi en fremda aerspaco, G./ en la internacia trafiko partoprenanta aviadilo estas deviga al la dogano kaj ceteraj kontroloj, H./ pro sekureca kaŭzo, ankaŭ la aviadon permeson havanta aviadilo povas esti deviga al la alteriĝo kaj estas kontrolebla, I./ fremdaj aviadiloj nur per speciala permeso povas transporti personojn kaj kamioni varojn inter du punktoj de la ŝtato, J./ el la teritoria suvereneco sekvas, ke inter la limoj de la ŝtato, ĉiu civila aviadilo estas sub jura potenco de sama ŝtato.

g./ Metas sin la demando: en vertikala spaco ĝis kia alteco disvastiĝas la suvereneco? Ekzistas pluraj teorioj, kiuj klopodas per diversaj argumentoj aserti, ke parte ĝis infinito, parte ĝis la supera limo de atmosfero ĝi etendiĝas. La socialisma jurisprudenco unuece rifuzas la teorion de infinito. El tiu starpunkto sekvas, ke la kosma spaco ne estas igebla sub la suverencon de iu ŝtato. Same opinideklaris kelkaj naciaj projektoj koncernaj ankaŭ pri la planadoj. Do, ili akceptas la principon de la libereco de kosma spaco, por esploro kaj uzo. Tiu pozitiva flanko de la principo samtempe donas ankaŭ tiun devigitecon, ke la ŝtatoj povas validigi tiun liberecon nur sen ofendo de intereso de aliaj ŝtatoj kaj tuta homaro. - En 1961 la Ĝenerala Asembleo de UN unuvoĉe decidis, ke la internacia juro, inkluzive ankaŭ la Ĉarton de UN, koncernas al la kosma spaco kaj astroj: la kosma spaco kaj astroj akorde kun reguloj de l'internacia juro, estas liberaj por malkovri kaj uzi per ĉiu ŝtato, sed ili ne estas eblaj por evikcii. - El la negativa flanko devenas la malpermesitaj agadoj, kiujn ni dividas en du grupojn: A./ kiuj malhelpas la aviadon en kosma spaco, B./ kaj tiuj agadoj, kiuj estas taŭgaj al rompo, disigo de ekvilibro de la naturo /p.e. infekto per mikroorganismo, la radioaktiva infekto/. - Formoj de militista uzado de la kosma spaco estas: a./ artefaritaj satelitoj por bombi, b./ artefaritaj satelitoj por esplori, c./ sistemo de artefaritaj satelitoj por raketedeflankigo, d./ konfuzo kaj konfuzosistemo, e./ artefaritaj satelitoj por meteorologiaj celoj, f./ komunikadaj sistemoj, g./ artefaritaj satelitoj por naŭtiko, h./ artefaritaj satelitoj por geodezio.

d./ La paca uzo de kosma spaco entenas du elementojn: 1./ specialaj efikoj de kosma spaco al sekureco de la ŝtatoj, 2./ aktuala analogio de paca uzo,

3./ universala karaktero pri komunaj interesoj de la agado de kosma spaco.

e./ Estas konata la agado de artefaritaj satelitoj por esploro, la aviadilo U-2, kiu fakte spionadas. Nia opinio tiu estas, ke devene el la surteraj juronormoj, ĉefe laŭ la internacia juro, ankaŭ en la kosma spaco farita spiono estas kontraŭjura. Tiun starpunkton protektas la menciitaj principoj.

Ĝuste pro tiaj celoj okazis la ekzilo de atomarmilo el la kosma spaco per la konvencio pri atomsilento de Moskvo en 1963. Al la pakto pli ol 100 landoj aliĝis, tiel ĝi kreis preskaŭ internacian juron. Do, ĉiu ŝtato, laŭ la ĝenerala regulo de internacia juro, havas rajton pri farado de necesaj aranĝoj kontraŭ tia agado en la kosma spaco, kiu laŭ sia juĝo, ĝi minacas lian sekurecon aŭ eston.

#### IV.

a./ Ni devas paroli ankaŭ pri jura situacio de astroj, planedoj. Estas konate, ke la okupado estas origina maniero de akiro de la /ter/teritorio. La decido de Ĝenerala Asembleo de UN eldiras, ke sur la planedo estas ne-ebla sama maniero de akiro.

Kelke da okcidentaj aŭtoroj okupis sin pri interrilato de la homoj kaj loĝantoj de aliaj planedoj. Ili ĉiuj konsideras la interesojn de loĝantoj de la aliaj planedoj. Ni ne kontestas, ke la homo ne estas sola en la universo, sed ĝis kiam la karakteron de tiuj estaĵoj ni ne konas, estas malfacile trovi la ĝustan traktadon.

La kosmoraketoj kaj la artefaritaj astroj ne estas konsideritaj kiel aviadiloj aŭ aera veturilo, kiujn koncernas la reguloj de la internacia aerajuro.

Estas internacie rekonita kaj ankaŭ el la teksto de la konvencio pri atomsilento de Moskvo oni povas konkludi, ke ankaŭ en la kosma spaco ĉiu ŝtato povas kontroli kaj havas jurpotencon sur la kosmaj meĥanismoj lanĉitaj per si mem.

b./ Ekzistas kelkaj specialaj demandoj praktikaj de la kosma spaco. Tiel: 1./ *d a m a ĝ o*, en kiu ankoraŭ ne estas unueca percepto. Pri ties procedo skribas la fakliteraturo, ke oni devus krei Internacian Garanti-Fundon al la kompenso, 2./ eldono de *a l t e r i ĝ i n t a j* kosmaj meĥanismoj kaj partoj, 3./ *s a v o* kaj eldono de *a k c i d e n t a j* *a s t r o n a ŭ t o j*, 4./ juraj problemoj de *m e t e o r o l o g i o* de kosma spaco, 5./ *t e l e k o m u n i k a d o* en la kosma spaco kaj la *i n t e r n a c i a j u r o*. Tiu ĉi problemoj jure estas solvita, ĉar en la konferenco de Ĝenevo en 1963, modife kelkajn ĉapitrojn de radiostatuto, oni konservis specialajn frekvenciojn por la servoj rilate al agado kaj uzado de kosma spaco.

#### V.

Krome estas pritraktinda la agado de internaciaj organizoj. Plej grava celo de UN estas la konservo de internacia paco kaj sekureco. Ĝuste pro tio en tiu organizaĵo oni klopodis trovi la solvon kaj konsenton de la problemoj de kosma spaco jam ekde 1958. Jam en jaro 1959 la Ĝenerala Asembleo de UN decidis pri formo de Komisiono Pri Kosma Spaco en sia kadro. En la komisiono estis kreitaj scienca-teknika kaj jura komisionoj. Per efiko de novaj teknikaj rezultoj la komisiono estis transformita per decido de Ĝenerala Asembleo de UN en 1962 kaj kreita la Komisiono Pri Paca Uzo de Kosma Spaco. Post longa, multa debato, eĉ akraj

disputoj pro kontraŭintereso de iuj ŝtatoj kaj ĝenerala homaro fine estis kreita la pakto grava.

## VI.

Hodiaŭ jam estas unueca la opinioj de la ŝtatoj, ke sekve el la Ĉarto de UN, en la kosma spaco estas ebla nur la paca agado.

La Asembleo de UN en 1966 aprobis la tre gravan kontrakton pri paca uzo de kosma spaco. Laŭ ĝi, la Luno kaj planedoj ne estas eblaj al eksproprieto por iu nacio: ili estas uzablaj nur por pacaj celoj: estas malpermesite sur ili konstrui bazon kaj elprovi armilojn. Same estas malpermesite venigi al vojo ĉirkaŭ la Terglobon, objekton instalitan per nuklea aŭ alia amaspereiga armiloj, krome ankaŭ estas malpermesite surmeti tiujn armilojn en la kosma spaco aŭ sur la astrojn. - La kontrakto estiĝis per la pordecida propono komuna de 41 landoj kaj estas absolute malkaŝa: en ĝi povas partopreni ĉiu lando.

Tiu ĉi interkonsento estas promesa rezulto de la tenecaj fortoŝtrecoj de multaj jaroj, Tiu estas rezulto de la diplomacia lukto, kies scenejo estis la mondorganizo UN. La kontrakto estas certeco, ke la ebloj de UN tute ne estas ankoraŭ elĉerpitaj, estas inde fari fortoŝtreĉojn en UN kaj por UN.

La kontrakto havas dek ĉapitrojn. Interalie ĝi eldiras, ke la nacioj kooperu en la esploro de kosma spaco.

Estas fakto, ke la kontrakto rilate al kosma spaco egale havas psikologian kaj politikan-praktikan signifon. Eble ĝi liberigas en parto de interpremigo, la homaron kaj plantas la esperon en la korojn, ke per persistema lukto oni povas atingi pli da konkretaĵoj rilate ankaŭ al malarmado. Fakte la kontrakto estas pacodokumento de la kosma spaco.

La pakto nomas la astronautojn -apartenantajn al iu ajn raso- kiel reprezentantojn, en la kosma spaco, de la universala homaro. Fakte, ekzistas universale homaj aferoj kaj interesoj, kiuj estas pli gravaj ol la ekonomia aŭ potenc-politika kolizio.

La destino de la homo estas sur la tero, ke li vivu kaj kreu. La konvencio pri la kosma spaco kreas unu el la bezonaj kondiĉoj. Se, tiurilate la pakto ne estas perfekta, tamen estas pli bone ol la pereco, kiu estas la negacio de la traktado.

## VII.

Pri la esploro de kosma spaco okupas sin sekve fakaj organizaĵoj internaciaj: 1./ Mondorganizaĵo Pri Meteorologio, 2./ Internacia Telekomunikada Unuiĝo, 3./ Internacia Organizaĵo Por Civila Aviado, 4./ Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de UN. -Grupo de Okcidentaj landoj por preparo kaj plenumo de la komuna programo pri esploro en kosma spaco en jaro 1962, en Paris oni formis Eŭropan Organizaĵon Pri Esploro De Kosma Spaco. Ĝi okupas sin pri esploro de supera atmosfero kaj tiu scienca de kosma spaco. Ne estas interŝtataj, sed tiuj privataj, organizaĵoj kiuj okupas sin pri la problemoj de kosma spaco: Internacia Konsilio de Sciencaj Unuiĝoj: Komisiono Pri Esploro de Kosma Spaco: Internacia Astronaŭta Federacio: Internacia Astronaŭta Akademio kaj Internacia Instituto De Kosma Spaco.

VIII.

En Hungario, la kultivantoj pri juro de kosma spaco, formis Komisionon en kadro de Hungara Juristo-Asocio. Ili konsistas el sciencaj esplorantoj, advokatoj, jurakonsilistoj ktp. La enhavon de la agado de Komisiono donas pluraj referaĵoj, alparoloj dum la internaciaj enketoj, kongresoj kaj ellaboro de gravaj projektoj. Ĝian elstaran agadon indikas tio, ke la Komisiono grave kontribuis al la estigo signifa por la intereso de tuta homaro, al pakto de UN. La afergvida prezidanto de la Komisiono estas membro de Direkcia Konsilio de la Internacia Instituto de Kosma Spaco.

Dro Lajos Márton  
-Budapest-

LA POZICIO DE ADVOKATO EN BELGUJO.

1. N o c i o .

A. Ĝenerala nocio.

1<sup>o</sup>/ Estas necese distingi reprezentigon kaj subtenon.

La sinprezento de reprezentanto egalvaloras la sinprezenton de la partio mem, kaj la reprezentanto rajtas subskribi ĉiujn procesaktojn nome de la partio.

La subtenanto nur pledas por la partio, ne reprezentas ĝin.

Kiam reprezentigo fare de sollicitoro estas deviga, ne la sollicitoro, nur advokato rajtas pledi.

2<sup>o</sup>/ a/ La partio devas mem sin prezenti antaŭ la kriminalaj kortumoj /escepte en malgravaj aferoj/.

b/ La partio povas mem sin prezenti antaŭ la pacjuĝistoj, la komercaj kortumoj kaj, en aferoj pri edziĝrompo, antaŭ la civilaj kortumoj unuinstancaj.

c/ La partio ne povas mem sin prezenti antaŭ la civilaj kortumoj unuinstancaj /escepte pri edziĝrompo/ kaj antaŭ la apelaciaj kortumoj, la kasacia kortumo kaj la supera administracia kortumo.

B. Ebleco de jura reprezentigo fare de personoj sen juraj kvalifiko.

a/ Kie la partio rajtas mem sin prezenti /vidu A, 2<sup>o</sup>, b/, ĝi povas reprezentigi fare de iu ajn komisiita persono.

Se la komisiulo ne estas advokato /aŭ, en edziĝrompaj aferoj, sollicitoro/, la juĝisto decidas, en ĉiu kazo, ĉu li akceptas la komisiulon kiel reprezentanton.

b/ En malgravaj kriminalaj kazoj, la partio povas elekti iun ajn reprezentanton antaŭ la plej malaltaj kortumoj /kondiĉe ke la reprezentanto estu akceptita/, sed nur sollicitoron antaŭ la kortumoj superaj.

c/ La juĝisto ne rajtas akcepti pledistojn aŭ jurajn konsultistojn kiel reprezentantojn.

C. Diversaj specoj de reprezentantoj kun juraj kvalifiko.

a/ Advokatoj. - Advokatoj kandidatoj /t.e. dum sia provtempo/ havas la samajn rajtojn kiel la advokatoj. Advokatoj-sollicitoroj: ĉe kortumoj unuinstancaj en malgrandaj uzboj kelkaj advokatoj samtempe estas sollicitoroj.

b/ Sollicitoroj. - /ĉe la kasacia kortumo, ili estas nomitaj: advokatoj ĉe la kasacia kortumo./

Notarioj nek estas juraj reprezentantoj nek pledas antaŭ kortumoj.



Juraj konsultistoj ne estas allasitaj kiel reprezentantoj aŭ pledantoj. Notarioj-advokatoj ne ekzistas en Belgujo.

D. Esencaj distingoĵ inter tiuj specoj.

a/ La solcitoro reprezentas la partion tie, kie reprezentigo estas deviga /vidu A, 2<sup>o</sup>, c/, escepte antaŭ la supera administracia kortumo. Li ankaŭ reprezentas la partion en malgravaĵ kriminalaj aferoj antaŭ la kortumoj unuinstancaj /vidu B, b/.

La solcitoro neniam pledas /escepte antaŭ la kasacia kortumo/.

b/ La advokato pledas antaŭ la kortumoj, kie reprezentigo per solcitoro estas deviga.

Antaŭ la supera administracia kortumo reprezentigo kaj pledo fare de advokato estas deviga.

Antaŭ la kasacia kortumo oni pledas tre malofte. Kiam pledo estas necesa, la solcitoro kutime, la advokato nur en esceptaj okazoj pledas.

Antaŭ la aliaj kortumoj, la advokato povas nur pledi, aŭ reprezenti kaj pledi. Tio lasta estas kutima.

2. K v a l i f i k o j.

A. Juraj studoj.

a/ Advokato: kvinjara studo ĉe jura fakultato en universitato kaj diplomo de doktoro pri juro.

b/ Solcitoro: ĉe la kasacia kortumo: devas esti advokato. Ĉe la aliaj kortumoj, kie ekzistas solcitoroj: kvinjara laboro kiel helpisto ĉe solcitoro kaj ekzameno pri la proceduro.

B. Postulata praktiko.

a/ Advokato: Post sia akcepto en advokataro, li devas labori dum tri jaroj sub la gvidado de "patrono", sed li rajtas akcepti kaj pledi aferojn memstare.

Dum sia trijara provtempo, la provtempulo devas aŭskulti lecionojn, precipe pri profesia sintenado.

b/ Solcitoro: Ĉe la kasacia kortumo: devas esti advokato kaj havi multjaran praktikon. Ĉe la aliaj kortumoj: la solcitoroj nur estas enoficigitaj post sia provtempo kvinjara /vidu A/.

C. Aliaj kvalifikoj.

Ĉu la advokato ĉu la solcitoro devas esti belgaj ŝtatanoj.

Solcitoro devas esti pli ol 25-jara.

Por advokatoj ne ekzistas aĝlimo; fakte oni ne povas fariĝi doktoro pri juro antaŭ aĝo 23-jara.

Kondamnoj sufiĉe gravaj nebligas la ekzercadon de ambaŭ profesioj.

3. R a j t o j k a j d e v o j.

a/ Civila proceso.

1<sup>o</sup>/ Reprezentigo per solcitoro estas deviga antaŭ la kasacia kortumo, antaŭ la apelaciaj kortumoj kaj, escepte en edziĝrompaj aferoj, antaŭ la unuinstancaj kortumoj, sed nur advokato rajtas pledi /vidu ankaŭ supre sub 1, D, b, pri la kasacia kortumo/.

2<sup>o</sup>/ Antaŭ la pacjuĝistoj kaj la komercaj kortumoj la advokato reprezentas la partion kaj pledas por ĝi, sed nek reprezentigo, nek pledo fare de advokato estas deviga.

b/ Kriminalaj procesoj.

1<sup>o</sup>/En ĉiuj aferoj la partio rajtas elekti advokaton. - En la plej gravaj aferoj la apudesto kaj pledo de advokato estas deviga. Se necese, la kortumo elektas advokaton, kiu devas pledi senpage.

2<sup>o</sup>/ La reprezentigo neniam estas deviga.

Ĝi kelkfoje estas permesata /vidu 1, B, b/.

3<sup>o</sup>/ La advokato rajtas konatigi kun la dokumentoj de la antaŭesploro: se la akuzito estas en malliberejo, almenaŭ la 33-an tagon post la malliberigo; se la akuzito estas libera, almenaŭ kiam la prokuroro decidis persekuti. Se la advokato deziras legi la dokumentojn pli frue, li devas peti la permeson, kiu nur estas rifuzita en esceptaj okazoj.

4<sup>o</sup>/ La advokato povas kontakti sian klienton en malliberejo tuj post la unua aŭskultado de la akuzito ĉe la juĝisto. Tiu aŭskultado nepre okazas dum la 24 horoj post la malliberigo.

En esceptaj okazoj la juĝisto povas malpermesi la kontaktigon, sed ne pli ol dum tri tagoj.

5<sup>o</sup>/ La advokato estas imuna en ĉiuj, ankaŭ politikaj, procesoj.

c/ Nekontraŭdiraj proceduroj.

La advokato reprezentas kaj pledas, aŭ la advokato pledas kaj la sollicitoro reprezentas, laŭ la distingoj supraj, sub 3, a.

Atentu, ke en Belĝujo ne ekzistas nekontraŭdira hereda proceduro.

d/ Administracia proceduro.

Antaŭ la supera kortumo la advokato reprezentas kaj pledas /vidu 1, D, b/.

Antaŭ la aliaj administraciaj instancoj la proceduro estas skriba. La advokatoj povas reprezenti la partion, sed ili kutime bezonas skriban komision, ne postulitan antaŭ la kortumoj.

#### 4. H o n o r a r i o j .

a/ Ne ekzistas iu tarifo. La advokato taksas la honorarion. La normoj estas: 1. la amplekso de la laboro, 2. la graveco de la afero, 3. la atingita rezultato. - Se la kliento malkonsentas, la advokata ĉambro taksas la honorarion. Finfine la kortumo decidas.

b/ Nenia kontrakto pri honorario estas permesata.

c/ Ĉiu partio, eĉ la gajninta, pagas la honorarion de sia advokato.

d/ Malriĉuloj povas peti la helpon de advokato. Tiu estas elektita en ĉiu aparta kazo fare de speciala advokata ĉambro; en kriminalaj kazoj la kortumo povas elekti advokaton, se la akuzito ne havas iun /en la plej gravaj kazoj la kortumo devas, vidu supre 3, b, 1<sup>o</sup>/.

La elektita advokato devas pritrakti la aferon, ĉu senpage, ĉu kontraŭ partpago de la normala honorario. La speciala ĉambro difinas la altecon de la partpago laŭ la financaj rimedoj de la malriĉulo. La advokato ne ricevas ion krom tiu eventuala partpago.

#### 5. O r g a n i z a ĵ o j .

A. Advokatoj.

1<sup>o</sup> Ĉe ĉiu unuinstanca kortumo ekzistas advokataro /france: barreau; ne-

derlandlingve: balie; angle: bar/.

La advokatoj elektas estraron /advokatan ĉambron/.

2<sup>o</sup> La advokata ĉambro decidas, ĉu doktoro pri juro, kiu volas fariĝi advokato, estas akceptota.

Kondiĉoj: esti doktoro pri juro, belga ŝtatano kaj bonmora.

Antaŭ sia enskribiĝo la kandidato devas fari ĵuron antaŭ la apelacia kortumo, ke li plenumos siajn devojn kiel advokato. La ĵuro ankaŭ entenas politikan parton, kiu, komprenita laŭlitere, malhelpus advokatojn agi kontraŭ la registaro, sed fakte la advokatoj estas tute liberaj en sia politika agado.

La advokata ĉambro havas disciplinan povon. Ĝi punas per diversaj gradoj de admonoj, per malpermeso ekzerci la profesion dum difinita tempo /ne pli ol dujare/, kaj per forstreko de la listo.

Estas eble apelacii kontraŭ la plej gravaj el tiuj punoj.

La ĉambro ankaŭ kontrolas la honorariojn.

4<sup>o</sup> Oni ne rajtas sin nomi advokato, se oni ne estas enskribita ĉe advokataro.

B. Solicitoroj: estas enoficigitaj per decido de la registaro, post propono de la koncerna kortumo.

## 6. S o c i a   p o z i c i o .

La advokatoj estas socie sur la sama plano kiel la ĵuĝistaro kaj la kuracistoj. Ilia politika influo ne plu estas tiel grava kiel en la pasinteco.

Finance la komencjaroj estas tre malfacilaj. Oni kutime ŝatas, ke la advokato bezonas dekon da jaroj por akiri sian pozicion.

La plejparto de la iom pli maljunaj advokatoj havas decajn rimedojn, kelkaj eĉ ampleksajn, sed neniu havas la eblecon akiri riĉecon.

Finance la kuracistoj estas versaĵne en multe pli bona situacio, almenaŭ en la urboj.

Prof. D-ro MARCEL ROOST

-Antwerpen-

## LA POZICIO DE ADVOKATO EN ANGLIO KAJ KIMRIO.

### E n k o n d u k o .

Unue oni devas atenti la fakton ke la apartaj regnoj en Granda Britio estas, de la vidpunkto de la interna juro, apartaj nacioj havantaj apartajn tradiciojn, kaj jursistemojn. Pro tio, kvankam la Britaj Parlamentaj Statutoj validas same en ekzemple Anglujo kaj Skotlando, la juĝejoj en tiuj landoj aplikas ilin laŭ la propraj sistemoj. Tial, angla advokato ne rajtas praktigi en la skotaj juĝejoj kaj inverse.

Anglujo kaj Kimrujo tamen pro longa asocio havas saman jursistemon kaj juristaron.

Plia kompliko rezultas el la fakto, ke ekzistas en Anglujo /kaj, kompreneble, ankaŭ en Kimrujo/ du apartaj specoj de juristoj: Solicitors /solicitoroj/ kaj barristers, alinome counsel /konsilistoj/.

La diferencoj inter ĉi tiuj du specoj ne estas /laŭ sufiĉe ofta erarkredo/ la diferenco inter advokato kaj notario. Ambaŭ el la du rajtas funkcii kiel advokato.

katoj kvankam kompreneble en ambaŭ fakoj okazas specialistiĝo.

Tamen kvankam konsilistoj rajtas funkcii antaŭ iu ajn juĝeja tribunalo, antaŭ la plej superaj kortumoj sollicitoro ne rajtas esti reprezentanto.

#### 1. N o c i o.

Ĉefprincipo estas, ke neniu estas devigata reprezentigi pere de juristo. Oni rajtas pledi por si antaŭ iu ajn juĝistaro aŭ administracia tribunalo.

Se oni ne deziras uzi tiun rajton, oni kutime nur rajtas reprezentigi per persono kun juraj kvalifikoj /t.e. aŭ sollicitoro aŭ konsilisto/.

Esepto okazas en la plej malsuperaj krimtribunaloj kie ofte policaj oficiroj aŭ ministrejaĵoj oficiatoj rolas kiel prokuroroj kaj en la plej malsuperaj civilaj procesoj kie foje ŝuldkolektistoj kaj lupagkolektistoj reprezentas klientojn.

Krome, aliaj profesiuloj aperas, de tempo al tempo, en la nomoj de ties klientoj antaŭ administraciaj tribunaloj kiam temas pri fakafero; ekzemple kontisto antaŭ impostkolektista tribunalo kaj termezuristo antaŭ bientribunalo.

Grave en la nuno estas la fakto, ke akcikompanion /kiu, laŭleĝe, estas persono/ nur juristo /kaj ne akcipoŝedanto aŭ direktoro/ rajtas reprezenti antaŭ juĝistaro.

#### 2. K v a l i f i k o j.

/a/ Sollicitoroj kvalifikiĝas post periodo /kutime kvin jaroj/ de lernado en la oficejo de sollicitoro kaj sukceso ĉe la ekzamenoj de la Law Society /Jur-societo/. Laŭrepute la ekzamenoj de la Law Society estas la plej malfacilaj el ĉiuj profesiaj ekzamenoj en la lando.

/b/ Konsilisto kvalifikiĝas post sukceso ĉe la ekzamenoj de la Bar Association /Konsilistara Asocio/ kaj periodo de aneco de iu el la historiaj Inns of Court /Kortumaj Ligoj/. Ne estas deviga iu periodo de praktika lernado, do kutime konsilisto aranĝas iĝi studento en la profesiaj ĉambroj de sperta konsilisto post sia kvalifikiĝo.

Nek por sollicitoro nek por konsilisto necesas universitata diplomo, sed nuntempe tiu diplomigo estas kutima.

#### 3. R a j t o j k a j d e v o j /vidu ankaŭ supre/.

En kazoj kie partio reprezentigas per konsilistoj tiu nur agas post instrukcio de sollicitoro. Tiu regulo validas ĉiam en civilaj procesoj kaj preskaŭ ĉiam en kriminalaj.

En gravaj kriminalaj procesoj okazas publika antaŭproceso, kie la akuzanto devas malkaŝi la atestaĵojn. Ĉe la antaŭ proceso la akuzito rajtas reprezentigi kaj ankaŭ rajtas tute silenti. De la komenco li rajtas kontakti juriston kaj tiu havas plenan rajton renkonti la klienton /eĉ en malliberejo/.

Ne ekzistas ia formala agnosko de diferenco inter politikaj kaj nepolitikaj procesoj.

#### 4. H o n o r a r i o.

En la advokata flanko de la jurista profesio la honorarion oni kutime fiksas surbaze de libera kontrakto. Tamen la kliento rajtas apelacii se li kredas ke

la postulo estas tro alta. Ankaŭ ekzistas tarifoj por kelkaj el la taskoj de solcitoro.

La honorarion de konsilisto kutime aranĝas ties sekretario kaj la solcitoro. La solcitoro pagas la konsiliston kaj la kliento la solcitoron.

La kontraŭa partio devas, se la tribunalo tiel decidas, pagi la elspezojn de la partio sukcesinta en la proceso.

Ekzistas sistemo de ŝtata pago de elspezo por personoj kiuj ne povas pagi la koston de reprezentigo.

## 5. O r g a n i z a ĵ o j .

La ĉefa profesia organizaĵo de la solcitoroj estas la Law Society. En okazo de profesia misfaro ĝi rajtas disciplini solcitoron kaj eventuale eĉ ekzigi lin el la profesio. Ĝi administras la solcitorajn ekzamenojn. Tamen membreco estas laŭvola. Ankaŭ ekzistas lokaj asocioj.

La organizaĵoj de la konsilistoj estas la Bar Association kune kun la Inns of Court. Ĉiu konsilisto estas ano de unu el la Inns.

Ofte oni diras ke tiu dueco en la jura profesio kondukas al malŝparo, do la demando pri kunfandigo estas ofte diskutata.

## 6. S o c i a p o z i c i o .

Eble pro la malfacileco de la profesionigo kaj la alta respondeco de la juristo, la socia pozicio de la profesio estas sufiĉe alte rigardata. La pozicio de la konsilisto estas pli alte rigardata ol tiu de la solcitoro.

Oni povas diri ke la solcitoron oni samnivele konsideras kiel ekzemple kuraciston.

S.R. Dulton  
solcitoro  
-Leeds-

## LA POZICIO DE ADVOKATO EN BULGARUJO.

Advokato povas esti ĉiu civitano de Popola Respubliko Bulgarujo, kiu finis la jurajn studojn, faris sian ekzamenon kaj trapasis sukcese la antaŭviditan provtempon de unu jaro, faritan en tribunalo, prokuroroficejo, arbitracio aŭ en jura konsilorganizaĵo /art. 2 kaj 5 de Ukazo pri Advokataro/.

Ne povas esti advokato nek advokato-kandidato: a/ la personoj senigitaj de la elektrorajtoj aŭ tiuj, kiuj ne rajtas okupi iun ŝtatan aŭ publikan poston; b/ la kondamnitaj je senigo de libereco pro krimoj, ĉe kiuj la persekutado kontraŭ la krimuloj estas realigata de la publika prokuroro, krom se la kondamnitato estas amnestiita, restarigita, aŭ se la konsilantaro de la advokata kolegio trovis, ke la krimo, pro kiu li estis kondamnitata, ne povas esti malhelpo por la praktikado de advokata profesio kiel malgrava, farita dum malplenaĝo aŭ dum aliaj specialaj cirkonstancoj; c/ persono kun malbona aŭ malhonora nomo en la socio; ĉ/ persono kun faŝismaj aŭ restarigaj konceptoj; kaj d/ persono, kiu estas oficisto en ŝtata institucio, entrepreno aŭ kooperativo. Escepto povas esti farita laŭ la decido de la advokata konsilantaro por la instruistoj en la altlernejoj kaj por ŝtataj sciencaj laboristoj, membroj de esploraj institucioj, kiujn oni

enskribas laŭ ofico, kaj kiuj ne estas membroj de la juraj konsilorganizaĵoj. Ili povas pledi nur antaŭ la supera kortumo, kiel ankaŭ doni skribajn kaj buŝajn konsilojn /art. 3 kaj 23 UA/.

Advokato donas antaŭ la advokata konsilantaro okaze de sia akceptiĝo la sekvantan promeson: "Mi promesas plenumi konsciencie miajn devojn kiel advokato, rilati al la kortumoj kaj aliaj ŝtataj organoj kun estimo, servi honeste al mia popolo kaj esti vera helpanto de la justeco" /art. 4 UA/.

La advokataj kandidatoj ricevas rekompencon, egalan al la rekompenco de la juĝistaj kandidatoj. Monrimedoj tiucele estas kolektataj de la membroj de la advokata kolegio /art. 6 UA/.

Konforme al art. 1 de UA la advokataro havas la taskon kunhelpi al la kortumoj kaj aliaj ŝtataj organoj por fortigo de la jura ordo kaj la socialisma leĝeco en PRB kaj doni juran helpon al la institucioj, entreprenoj, kooperativoj kaj aliaj publikaj organizaĵoj. Advokato donas buŝajn kaj skribajn konsilojn, verkas ĉiujn ajn jurajn dokumentojn kaj donas detalajn klarigojn pri certa demando kaj reprezentas, pledas siajn klientojn antaŭ la kortumoj kaj la oficejoj. Reprezentantoj de la partioj kaj pledantoj povas esti nur la advokatoj, krom kiam la leĝo preskribas alimaniere /art. 20 de Civilprocedura Kodo/. Proceso en kortumo kun la partopreno de prokuroro kaj sen la partopreno de advokato-pledanto estas nepermesita, krom se la juĝisto kategorie deklaras, ke li rifuzas la pledon. Neallaso de la pledanto de la juĝato aŭ la rifuzo de la kortumo aŭskulti ĝis fino la argumentojn de la pledanto estas rompo de la regulo de pledo.

Al juĝato, kiun oni akuzas pro farita krimo, pri kiu estas antaŭvidita mortpuno aŭ senigo de libero ne pli malmulte ol 10 jarojn, oni difinas pledanton laŭofice, se la juĝato mem ne elektis sian advokaton /art. 291 de Punprocedura Kodo/.

Personoj malaperintaj aŭ personoj, kies loĝloko ne estas konata, estas reprezentataj de la oficistoj de la kortumo /art. 16 al. IV, V de Civilprocedura Kodo/. Se eĉ en la komenco de la proceso la loĝloko aŭ adreso de la akuzito estas nekonata, li estas alvokata per publikigo en la aldono al "Uzbecmus" /Sciigoj/ de la Prezidentaro de Popola Asembleo /parlamento/. Se malgraŭ la publikigo la akuzito ne venis en la kortumon dum la juĝprocedado, la kortumo al li nomas reprezentanton /art. 50 CPK/. Kiam la petskribanto ne havas eblecon montri la nomon kaj la adreson de la kontraŭpartio, la kortumo nomas al tiu partio reprezentanton /art. 168 CPK/. Se la loĝloko de la ŝuldanto estas nekonata, la popola juĝisto laŭ la loko de la plenumo kaj certiginte laŭofice pri tio, nomas reprezentanton al la ŝuldanto /art. 327 CPK/.

Reprezentado de malriĉa partio estas senpaga. La personoj, al kiuj la prezidanto de la distrikta kortumo aŭ la popola paciga juĝisto rekonas, ke ili ne havas sufiĉe da monrimedoj por pagi la proceskostojn, enportas en la kason de la kortumo nenion. Tiukaze la kostoj de la juĝproceso estas pagataj el la monsumoj antaŭviditaj en la buĝeto de la ŝtato. Leĝo antaŭvidas, ke tiuj ĉi kostoj estu repagitaj de la kondamnita partio, sed ilin ne pagas petskribinto perdinta la proceson.

La advokataro estas organizita en advokataj kolegioj. La ministro de la justeco difinas la nombron de la advokatoj kaj advokataj kandidatoj en la advokataj kolegioj konforme al la jara plano. La advokata kolegio estas libervola organizaĵo de ĉiuj advokatoj en la regiono de ĉiu distrikta kortumo. Advokatan kolecion oni povas formi ankaŭ en la sidejo de la popola /paciga/ kortumo per permeso

de la Ministro de la Justeco. La advokata kolegio estas jura persono. Ĝiaj organoj estas la ĝeneralkunveno, la konsilantaro de la advokata kolegio kaj la kontrolo konsilantaro.

La ĝeneralkunveno elektas la advokatan kaj la kontrolan konsilantarojn. Ĝi pritraktas kaj aprobas aŭ malaprobas ilian agadon. Akceptas la buĝeton k.a. la advokata konsilantaro faras la komisiitan al ĝi laboron, ĉefe tiun montritan en art. 12 de la Ukazo de la advokataro. Ĝi akceptas, eksigas kaj forstrekas la membrojn de la advokata kolegio kun la aprobo de la Ministerio de la Justeco, kontrolas ilian agadon, organizas la jurajn konsilorganizaĵojn en la regiono de la advokata kolegio kaj gvidas ties agadon; prezentas raporton pri la agado de la advokata kolegio al la Ministerio de la Justeco; ellaboras la buĝeton kaj administras la havaĵon de la kolegio; akceptas advokatajn kandidatojn kaj kontrolas ilian provtempon.

Ankaŭ la jura konsilorganizaĵo estas jura persono. Ĝiaj organoj estas la ĝeneralkunveno kaj sekretario. La sekretario estas nomata de la advokata konsilantaro. La sekretario de la jura konsilorganizaĵo gvidas ĝian laboron, kaj respondacas por ĝi. Nur li kontraktas kun klientoj. Li distribuas la laboron inter la advokatoj, konsiderante la deziron de la klientoj kaj kontrolas ĝian plenumon. La honorariojn oni pagas al la kaso de la jura konsilorganizaĵo. Ĉiu advokato ricevas de la kaso tiujn sumojn, kiuj estas pagitaj por la laboro farita de li, post redukto de la procento por kontentigi la komunajn kostojn de la konsilorganizaĵo kaj aliajn elspezojn antaŭviditajn de la leĝo aŭ la regularoj. La membreco en la jura konsilorganizaĵo estas deviga, kie estas tia. La detalaĵoj pri la rajtoj, devigoj kaj la respondeco de la advokatoj estas montritaj en UA.

De la supre skribita teksto oni povas kompreni, ke la advokataro en Bulgarujo estas memreganta publika organizaĵo konstruita konforme al la principo de la socialisma demokratismo.

La pozicio de la advokataro ĉe ni estas tia, kia estas tiu de la labora intelektularo. La tasko de la labora intelektularo, kiu mem ne formas socian klason, estas helpi la gvidantan laboristan klason kaj ĝian antaŭan taĉmenton, la Bulgaran Komunistan Partion /BKP/, en asocio kun la laboraj kamparanoj, konstrui kaj fortikigi la komunismen en ĝiaj du fazoj: 1/ la socialisma socio kaj 2/ la komunisma socio.

Kune kun la kortumo, prokurorofico, ankaŭ la juraj konsilorganizaĵoj estas grava faktoro por korekta plenumado kaj aplikado de la socialismaj leĝoj, ukazoj, dekretoj, regularoj kaj ordonoj, eldonitaj de la kompetentaj ŝtataj organoj kaj por subteni kaj fortikigi la ekzistantan juran ordon. Krome la advokatoj ĉe ni aktive partoprenas en la socipolitikaĵoj, en kiuj ili, profitante siajn konojn kaj sian praktikon de juraj specialistoj, klarigas al la vastaj popoloj la signifon de la socialisma leĝeco. Ĉar la advokatoj laboras en socialista socio, en kiu la publikaj interesoj okupas la unuan lokon, socio, en kiu malestas ekspluatado de homo al homo, en kiu la sociaj kaj la personaj interesoj estas harmoniaj, la advokatoj, pledante la interesojn de siaj klientoj, gvidas sin antaŭ ĉio de la publikaj interesoj. Tiunmaniere ili per sia agado aktive kunhelpas la kortumon, prokuroroficon kaj aliajn ŝtatajn organojn en serĉado de la vero, kiu troviĝas en la vivo, t. e. ili serĉas la materian veron, kaj ne tiun, kiu estas abstrakta, transcenda, eterna, al kiu oni oficiale strebis ĉe ni antaŭ la socialisma sociordo.

La kompenso de la advokato pro la farita laboro al la kliento estas difi-

nita de la sekretario de la konsilorganizaĵo, kaj se la pledanto aŭ la rajtigito ne plenumas bone la komisiitan al li laboron pro nescio de sia profesio, pro sen-skrupuleco aŭ pro iu alia kontraŭleĝa kaŭzo, li ricevas respektivan punon, difinitan en UA aŭ en aliaj leĝoj. Ĉi tiuj faktoj ankaŭ efikas, ke la advokataro faru sian laboron ĝustatempe kaj precize. Pro tio la respekto de la advokato en Bulgarujo kreskas pli kaj pli kune kun la fortigo de la socialisma sociordo. Tamen por plia altigo de la advokata profesio oni devas ankoraŭ labori. Jam oni preparas novajn rimedojn. Unu el ĉi tiuj rimedoj estas la pli justa distribuo de la procesoj inter la membroj de la konsilorganizaĵo, kaj per tio oni celas sekurigi pli konvenan vivtenon al ĉiu membro.

Rilate al la punkto 6 de la demandaro mi ne povis kolekti plenajn sciigojn pri ĉiuj juristaj okupoj kaj pro tio donas nur kelkajn informojn. Oni povas diri, ke inter la mezaj enspezoj de la advokatoj kompare kun la enspezoj de la juĝistoj, prokuroroj k.s. ne ekzistas granda diferenco, ĉar ĉiuj kvalifikitaj oficistoj estas bone pagataj, kiaj estas la menciitaj juristaj okupoj.

De la enhavo de ĉi tiu raporto oni povas konkludi, ke la publika opinio ĉe ni pri la rolo de la advokataro estas pozitiva, t. e. ĝi konsideras ĝian agon publike utila, necesa kaj merita la plej grandan estimon. Sekve, oni ne neas la advokataron kiel institucion.

Andrej Aleksandrov Kamburov  
-Kolarovgrad-

LA JURO EN U.S.A.

III.

/daŭrigo/

A. Oferto kaj akcepto

La regulojn pri kontraktado en Usono preskaŭ ĉiujn konstruis anglaj kaj usonaj juĝistoj per kaj surbaze de siaj decidoj dum la jarcentoj. Por dana juristo estas stranga la fakto, ke ĝis ĝia akcepto nura promeso ne estas plenumenda de la promesanto. Tial ofertanto povas ĉiam revoki sian oferton, se la revoko atingas la akceptonton antaŭ ties akcepto, eĉ se la ofertanto deklaris la oferton nerevokebla dum certa tempodaŭro. Tiun regulon rezultigas la doktrino pri rekompenco, laŭ kiu promeso sen kontraŭvaloro ne estas valida.

Tamen por protekti la ofertoricevanton kontraŭ neatendata revoko la kortumoj ofte rifuzas apliki la principon pri revokebleco, ekzemple ofte en la kazo de oferta por unupromesa kontrakto /t.e. oferta, kiun oni povas akcepti per la ago petita, kontraŭe al oferta por dupromesa kontrakto, kiun karakterizas la fakto, ke la ofertanto petas de la alia partio ne agadon, sed promeson ke li faros la agon/. Se la aganto en unupromesa kontrakto jam finis gravan parton de la koncerna ago, la ofertanto ne plu povas revoki la oferton kaj tiel malebligi la kontrakton, ĉar alie la ofertoricevanto estus vane farinta la jam faritan laboron. En aliaj kazoj estas eble por la juĝisto interpreti unupromesan kontrakton kiel efektive dupromesan kaj trovi en la komencita agado de la ofertoricevanto implicate lian akcepton de la oferta kaj lian promeson plene plenumi la kontrakton; ankaŭ tia interpreto -fikcia kia ĝi estas- malebligas la revokon de ofertoj.



Por eviti tiajn fikciajn interpretojn kaj konstruojn pluraj ŝtatoj en Usono per leĝo decidis, ke ĉiuj skribaj ofertoj subskribitaj de la ofertanto kaj deklarantaj, ke li ne revokos ilin estas nerevokeblaj.

Kiel en dana juro la akcepto kutime ekvalidas je ĝia ricevo de la ofertanto. Tamen en la okazo de kontraktado per korespondado, la kontrakto estas farita laŭ malnova angla juĝo jam je la forsendo de la akcepta letero de la akceptanto. Sed tiun strangan regulon la ofertanto ja ofte povas eviti kondiĉante la faradon de la kontrakto per efektiva ricevo de la akcepto.

Simile kiel en dana juro oni konsideras malfruan akcepton nova oferto; tamen en usona juro ĝenerale ne estas necese, ke la /unua/ ofertanto avertu la akceptanton, ke tiu malprave kredis, ke la akcepto estos atinginta la ofertanton sufiĉe frutempe - la akceptanto mem portu la riskon de sia malfruigo! Ankaŭ nekongforma akcepto estas konsiderata nova oferto; se la akceptanto erare kredas, ke la akcepto estas kongforma al la oferto, la usona juro -kiel la dana- postulas, ke la ofertanto avertu la akceptanton, ĉar en ĉi tiu kazo verŝajne li mem /la ofertanto/ per neklaraj kondiĉoj en sia oferto kaŭzis la miskomprenon de la akceptanto.

Kiel en la dana juro, malakcepto de oferto ekvalidas, kiam ĝi estas ricevita de la ofertanto /kontraŭe al akcepto per korespondado/.

#### B. Rekompenco

Ĝe se ĉiuj supre menciitaj postuloj estas kontentigitaj, kontrakto rezultas laŭ la angla-usona doktrino pri rekompenco nur, se akompanas la promeson kroma faktoro, intersaĝo de valoroj, nomita "consideration" /rekompenco/. Tiu rekompenco devas konsisti el ago, preterlaso aŭ kontraŭpromeso farita intersaĝe por la promeso /de la ofertanto/ kiel rezulto de interkonsento kaj kaŭzanta utilon al la promesanto aŭ malutilon al la promesricevanto. Estas konsekvenco de tiu doktrino, ke promeso ne subtenata per rekompenco ne estas per si mem plenumenda kiel ekzemple donacpromeso aŭ, kiel ni vidis, oferto. Tiun doktrinon pri rekompenco, rigidan kaj strangan al eksterlandaj juristoj, oni povas klarigi nur en historia perspektivo /kion la verkinto ne klopodas fari en ĉi tiu resumo/.

Por ilustrati la doktrinon mi citu nur kelkajn malmultajn juĝojn. Ekzemplo de rekompenco konsistanta el ago: Onklo promesis al nevo \$ 5000, se li studos en universitato. Nevo studis, kaj onklo devis pagi. Ekzemplo de preterlaso: Onklo promesis al nevo \$ 500, se li ne fumos ĝis sia 21-a jaro. Nevo ne fumis, kaj la monsumo estis postulebla. Tiu ekzemplo montras ankaŭ tion, ke neniel estas necese, ke la rekompenco havu financon valoron egalan al la promeso.

Rilate al dupromesaj kontraktoj, unu promeso estas rekompenco por la alia, kondiĉe ke la promesoj kaŭzas utilon al la promesanto aŭ malutilon al la promesricevanto. Tial, se oni promesas agon aŭ preterlason, kiun oni jam jure ŝuldas al la promesricevanto, tiu promeso kaŭzas nek utilon nek malutilon kaj sekve - laŭ la doktrino pri la "jam ekzistanta devo" - tiu promeso ne povas validigi kontraŭan promeson faritan de la promesricevanto.

Tiu doktrino pri la jam ekzistanta devo malebligas ekzemple la validecon de promeso al servisto aŭ laboristo pri pli alta salajro kaj simile la validecon de promeso de kreditoro al ŝuldanto, ke li kontentigos sin per ricevo de parto de la ŝuldo pagota; -malgraŭ la promesoj- la laboristo ne povas postuli la ekstran pagon por siaj servoj, se ĝi estas rifuzata, kaj la kreditoro povas ankoraŭ postuli pagon de la tuta ŝuldo. La doktrino estas tre kritikata, kaj la tribuna-

loj ofte evitas ĝian aplikon per interpretado fikcia. Ekzemple oni povas per streĉita interpreto trovi promeson pri pli alta salajro kiel nuligon de la antaŭa kontrakto kaj samtempan faradon de alia nova, kiu ja nun povas esti valida, ĉar ĝi konsistas el du novaj promesoj ne jam ekzistantaj. Cetere, se oni povas trovi ke la laboro por kiu ekstra pago estas promesita, estas eĉ nur iomete ŝanĝita, oni ne plu povas paroli pri jam ekzistanta devo, ĉar la devo ja estas iomete aliigita, kaj sekve la kontrakto estas savita. Simile, se kreditoro ne nur promesas al ŝuldanto, ke li nuligos parton de lia ŝuldo, sed samtempe ankaŭ petas pagon ekzemple antaŭ la paga limdato aŭ en alia loko ol en tiu pri kiu la partioj antaŭe interkonsentis, li tiel ŝanĝas la jam ekzistantan devon de la ŝuldanto, ke lia promeso /tiu de la kreditoro/ povas ekvalidi. Estu menciite, ke likvido de ŝuldo per pagakordiĝo inter ŝuldanto kaj liaj kreditoroj validas, ĉar la kreditoroj ne nur promesas al la ŝuldanto, ke ili akceptos nuran parton de lia ŝuldo al ili kiel kontentigan, sed krome ili tion promesas ankaŭ unu al la alia.

La doktrino pri la jam ekzistanta devo montriĝis tiel nesufiĉa por la praktika vivo, ke pluraj ŝtatoj usonaj abolis ĝin, deklarante ke skribaj promesoj ŝanĝantaj aŭ nuligantaj kontraktojn aŭ aliajn devojn estas validaj eĉ sen rekompenco.

Kvankam, do, promeso fari tion, kion la promesanto jam ŝuldas al la promesricevanto ne konsistigas rekompencon, kiu povas validigi kontraŭpromeson de la promesricevanto, tamen promeso plenumi tion jam jure ŝuldatan al la promesricevanto ofte ne bezonas novan rekompencon por ekvalidi laŭ la doktrino pri "pasinta rekompenco". Tiu doktrino fakte estas artifiko por povi validigi promesojn ne respektante la rigidajn regulojn de la "vera" doktrino pri rekompenco, kaj tial la doktrino pri pasinta rekompenco efektive estas escepto de la doktrino de rekompenco.

Laŭ la doktrino pri pasinta rekompenco, promeso de ŝuldanto ke li pagos sian ŝuldon -ĉu postuleblan, ĉu preskriptitan- estas valida kaj komencas novan tempopason preskriptigan; sed la ŝuldo de iu persono ne estas pasinta rekompenco por promeso de aliulo, ke li pagos la ŝuldon de la ŝuldanto, kaj tial ekestis la stranga regulo, ke promeso de kaŭcio por ŝuldanto ne estas per si mem valida en Usono.

Laŭ la doktrino pri pasinta rekompenco ekvalidas sen "vera" rekompenco ankaŭ nova promeso plenumi antaŭan promeson nuligeblan pro la tiama neplenaĝo de la promesanto aŭ pro devigo aŭ trompo farita kontraŭ li. Simile estas valida promeso pagi por servo jam plenumita por la promesanto, kondiĉe ke la servinto plenumis responde al peto de la promesanto. Aliflanke, ĝenerale oni ne konsideras antaŭan devon nur moralan, sed ne juran, pasinta rekompenco, kiu povas validigi postan promeson plenumi tion, kion la morala devo postulas. Do, se persono savas la vivon de alia, kaj la dankema savito promesas al la savinto gratifon pro lia heroo ago, la gratifo tamen ne estas postulebla.

Fine alia grava escepto de la doktrino pri rekompenco estu klarigata -tiu de la doktrino pri promesa ŝtopo /"promissory estoppel"/. Laŭ tiu doktrino promeso estas plenumenda, kvankam ekzistas nenia rekompenco, se la promesricevanto laŭrezone fidis la promeson kaj sekve agis -aŭ preterlasis agi- tiel, ke li suferos gravegan malutilon kaj perdon, se la promeso ne estos plenumita. Kelkfoje oni diris, ke la promesanto estas ŝtopata /barata, malpermesata/ nei la ekziston de rekompenco, aŭ ke li estas ŝtopata nei sian respondecon. Tamen, tio estas fikcia kaj komplika, kaj plejofte nuntempe oni simple diras, ke en tiuj ka-

zoj, promeso validas sen rekompenco. Ekzemple, kiam ŝuldanto promesas, ke li nepre ne uzos preskripton kiel defendon en eventuala proceso tiel kaŭzante, ke lia kreditoro ne renovigas la ŝuldon, tiam la promeso estos konsiderata valida, kaj la kreditoro ne perdos sian rajton kontraŭ la ŝuldanto kiel kutime je la fino de la tempodaŭro preskriptiga.

#### IV. Konkludo

Por pli bone povi ilustrati la regulojn koncerne la faradon de kontraktoj, juraj verkistoj kreis du teoriojn tiurilate, la "interkonsentan teorion" kaj la "promesan teorion". Laŭ la interkonsenta teorio nura promeso ne povas krei devojn kaj rajtojn, sed krome akcepto estas ĉiam necesa. Laŭ la promesa teorio la promeso surmetas sur la promesanton devojn tuj kiam la promesricevanto ekscias pri la promeso, sed la promesanto povas kondiĉi per la akcepto de la promesricevanto la daŭran ekziston de la devoj kreitaj. Nun, en la perspektivo de la du "puraj" teoriaj principoj oni povas resumi la juron pri kontraktado en Danlando kaj Usono tiel:

La baza principo en la dana juro estas, ke promesoj estas plenumendaj; nur se specialaj kromaj faktoroj kiel trompo aŭ ekspluato estas pruvitaj, oni povas liberigi la promesanton de lia promeso. Male, en Usono promeso estas nur plenumenda, se ĉeestas kromaj faktoroj kiel akcepto kaj rekompenco. Alivorte, dana juro principe baziĝas sur la promesa teorio, sed usona juro sur la interkonsenta teorio - spicita per la doktrino pri rekompenco.

Laŭ la opinio de la verkinto la danaj reguloj pli bone kontentigas la bezonojn de la komerca vivo de hodiaŭ. Estas utile por la komerco, ke ofertoricevanto povas fidi je la oferto ricevita kaj serioze esplori la eblecojn por negocado surbaze de la oferto, ne timante ke ĝin subite revokas la ofertanto laŭplaĉe kiam ajn. Kaj se ofertoricevantoj estas protektataj kontraŭ revoko de ofertoj, ili verŝajne emas rekompenci la promesantojn pli malavare, ol kiam la timo pri subita revoko de la oferto necesigas ĝian tro rapidan akcepton. Cetere estas normale plenumi oniajn promesojn, kaj la juro devas subteni tion, kion la socio konsideras normala kaj justa.

Sed kial, do, usona juro ne evoluigis similajn regulojn kiel la danajn, avantaĝajn al moderna komercado? La respondo verŝajne estas, ke tion malhelpis la doktrino pri rekompenco, ĉar la doktrino ja kondiĉas la validecon de promeso per interkonsento pri kontraŭvaloro por ĝi, kaj tia kondiĉo implicas ja akcepton de la promeso; sendube tial usona juro principe restas surbaze de la interkonsenta teorio. Tamen per juĝaj decidoj kaj leĝofarado la usona juro klopodas superuzi kaj la interkonsentan teorion kaj la doktrinon pri rekompenco.

Unue, kiel klarigite, usonaj tribunaloj malpermesas la revokon de oferto por unupromesa kontrakto, aŭ kiam la promesricevanto jam finis gravan parton de la laboro petita, aŭ eĉ kiam li nur komercis la agadon, se tiu agado povas esti interpretata fikcie kiel akcepto de la oferto farita. En la kazo de dupromesaj kontraktoj, se la ofertoricevanto fidus je la oferto kaj agas konforme, eĉ ne formale akceptinte, la ofertanto ofte estas ŝtopata revoki sian oferton. Fine, la leĝoj en pluraj usonaj ŝtatoj malpermesas la revokon de certaj skribaj ofertoj.

La supre priskribitajn regulojn mallongigantajn la periodon dum kiam promesanto povas revoki sian promeson, aŭ tute malpermesantajn revokon, la verkinto konsideras klopodon de usona juro por alproksimiĝi al la promesa teorio, kiu ja

ne toleras revokon de oferto /post kiam la ofertoricevanto ekscias pri ĝi/ dum la promesita aŭ laŭrezona tempodaŭro.

Rilate al kontraktado per korespondado, la akcepto ekvalidas jam ekde forsendo. Tiu regulo estas defendebla nur kiel mallongiganta la periodon de revokebleco de ofertoj, tiel iusence strebante al la promesa teorio; sed cetere ĝi estas kritikinda, ĉar oni tiris el ĝi la malfeliĉan konsekvencon, ke akcepto ekvalidas ekde ekspedo, eĉ se la ofertanto neniam estos ricevinta la akcepton kaj tiel tute ne povas scii, ke la kontrakto estas farita. Plie, se la akceptanto jam forsendis sian akcepton, sed poste bedaŭras tion kaj tial sendas /eksprese/ malakcepton kiu preterpasas la akcepton kaj kiel la unua atingas la ofertanton, oni ne aplikas la regulon pri ekvalido je forsendo. Tial tiu regulo, kies nura ekzistorajto estas malnova angla juĝo, estas sufiĉe konfuziga.

- - -

La interkonsentan teorion kaj la doktrinion pri rekompenco oni kutime defendas, ĉar tiuj du instigas kontraktantojn respekti siajn interkonsentojn. Tio estas bona, sed apenaŭ sufiĉe bona hodiaŭ, kiam estas bezonata respekto ne nur al interkonsentoj, sed al promesoj. Tial, kiel ni vidis, la usona juro ne nur klopodas limigi la konsekvencojn de la interkonsenta teorio, sed ĝi kreis ankaŭ multajn esceptojn de la doktrino pri rekompenco.

Oni penis defendi la doktrinion pri rekompenco ankaŭ de alia flanko, nome kiel garantion de la justeco de unuopaj kontraktoj. Tiu garantio, tamen, ŝajnas ne perfekta.

La verkinto montris, ke la doktrino kaj ĝia subdoktrino pri la jam ekzistanta devo malebligas la validecon de promeso de kreditoro, ke li kontentigos sin per ricevo de nur parto de monsumo ŝuldita al li, ĉar tia promeso estas senrekompensa. Tiel la doktrino laŭdire garantias, ke ŝuldanto -minacante ke li pagos aŭ parton de la ŝuldo aŭ nenion- ne povas devigi la kreditoron kontentigi pri nura partopago. Same, ne estas valida promeso senrekompensa pri pli alta pago al dungito; ĉar alie tiu ja povas minaci, ke li ne faros la laboron interkonsentitan, se li ne ricevos pli altan salajron. Tamen, ne konsiderante la fakton, ke kutime ne estas la kreditoro aŭ la mastro kiu estas la malforta partio, kaj ankaŭ ignorante la fakton, ke en la praktika vivo kreditoro ofte preferas tujan pagon de parto de sia bonhavo ol estonta ebleco pri pago de la tutaĵo, oni povas argumenti, ke oni tre ofte povas eviti tiun garantion de justeco, kiun laŭsupoze konsistigas la doktrino pri rekompenco, ĉar la partioj ja simple povas aŭ formale nuligi la jam ekzistantajn devojn aŭ ilin iomete ŝanĝi, tiel kreante validan, eĉ se ne realan rekompencan por la koncerna promeso de la kreditoro aŭ la mastro. Ĉar la doktrino ne kapablas funkcii kiel garantio kaj ĉar ĝi estas en multaj kazoj eĉ maljusta, ne estas mirige, ke usona juro per juĝa interpretado aŭ per leĝoj grandparte nuligas la doktrinion.

Laŭ la dana juro promesoj pri ekstra pago aŭ pri parta aŭ tuta liberigo de ŝuldo estas plenumendaj kiel ĉiu alia promeso; nur se devigo aŭ trompo k.s. estas pruvita aŭ se la doktrino pri antaŭsupozoj povas esti aplikata, oni povas liberigi la promesanton de sia promeso.

Fine estu menciinta la embaraso, kiu ne malofte sekvas el la neplenumendo de promesoj kaj el tiu escepto de la doktrino pri rekompenco, kiun oni nomas pasinta rekompenco: Ofte ja ne estas eble, kaj certe pli ofte ne estas juste, distingigi inter la juraj kaj moralaj devoj de la promesanto, el kiuj nur la juraj devoj povas validigi lian postan promeson ilin plenumi. Tiam embarason ne

konas dana juro, laŭ kiu ĉiuj promesoj estas plenumendaj, senkonsidere ĉu la motivo por fari la promeson estas jura aŭ morala.

- - -

Ne kaŝante la bazajn diferencojn inter dana kaj usona juro, la verkinto klopodis montri ankaŭ, kiel la du jursistemoj alproksimiĝas unu al la alia, ĉefe, tamen, per strebado de usona juro al sistemo simila al la dana. En mondo aspiranta al unueco oni emfazis similecojn kaj ne akcentu malsimilecojn por krei el kompara juro kvazaŭ skizaron por estonta mapo de la juro de la tutmondo. Ke, ĉi tiu studo por tia mapo estu kontribuo de almenaŭ hezitema linio.

Eskil Svane  
-New York-

## LA ŜTATANECO EN LA AŬSTRA JURO

### Enkonduko.

La Respubliko Aŭstrio estas federacia ŝtato konsistanta el naŭ "federaciaj landoj". Apud tiuj landoj staras la "federacio", t.e. la centra instanco, kies teritorio ampleksas la teritoriojn de ĉiuj naŭ federaciaj landoj kune.

Laŭ la aŭstra Federacia Konstitucio ekzistas nur unueca aŭstra ŝtataneco, sen diferencigo laŭ la landoj. La leĝdonan kompetenteco en la aferoj de la ŝtataneco havas la federacio, do, la Nacia Parlamento. La plenumo de tiuj federaciaj leĝoj tamen apartenas al la kompetenteco de landoj.

La nun validanta leĝo pri ŝtataneco estas la federacia leĝo pri la aŭstra ŝtataneco - Federacia Leĝpublikilo n-ro 250 - de jaro 1965. Tiu leĝo anstataŭas la malnovan leĝon de 1949.

### 1. Akiro de ŝtataneco.

#### a./ Laŭleĝaj kaŭzoj.

aa./ Per deveno /naskiĝo/, Legitima infano akiras per sia naskiĝo la ŝtataneco, se ĝia patro en tiu momento estas ŝtatano, aŭ se li mortis antaŭ ĝia naskiĝo kaj ĉe sia morto havis la ŝtataneco. Se la patro estas fremdulo /t.e. ano de alia ŝtato aŭ sen ŝtataneco/, lia legitima infano akiras per sia naskiĝo la ŝtataneco, se ĝia patrino estas ŝtatanino kaj se ĝi alikaze estus sen ŝtataneco. - Nelegitima infano akiras per naskiĝo la ŝtataneco, se ĝia patrino en tiu momento estas ŝtatanino.

bb./ Per legitimigo. Se fremdulo, kiu estas naskita kiel nelegitima infano, poste estas legitimigata kaj en tiu momento estas ankoraŭ neplenaĝa kaj needzigitata, li akiras per la legitimigo la ŝtataneco, se lia patro estas ŝtatano aŭ antaŭe mortis havante la ŝtataneco. Samtempe la nelegitimaj infanoj de legitimigata virino akiras la ŝtataneco.

cc./ Per deklaro. Fremdulino akiras la ŝtataneco per la deklaro, ke ŝi volas esti fidela ŝtatanino de la Respubliko, se ŝia edzo estas ŝtatano, la edzeco ne estas disigita kaj ŝi ne estas fremdulino pro antaŭa administracia forpreno de la ŝtataneco.

ĉĉ./ Per ekdeĵoro kiel altlerneja profesoro. Fremdulo akiras la ŝtataneco per

ekdeĵoro kiel altlerneja profesoro ĉe aŭstra scienca altlernejo, ĉe la Akademio de Belaj Artoj en Vieno aŭ ĉe aŭstra art-akademio.

b./ Akiro laŭ peto /per administracia decido/:

aa./ La ŝtataneco povas esti koncesiata al fremdulo, se li ek de minimume dek jaroj seninterrompe havis sian daŭran loĝlokon sur la teritorio de la Respubliko, kaj se li krome plenumas diversajn kondiĉojn /ekz. ne estas punita pro certaj deliktoj, ne estas en tiaj rilatoj kun fremdaj ŝtatoj, ke la koncesio de la ŝtataneco malutilus al la interesoj aŭ al la reputacio de la Respubliko, ktp./ La ŝtataneco tamen ne rajtas esti koncesiata al fremdulo, se li ne faris ĉion eblan por demeti sian antaŭan ŝtatanecon; ĉi tio ne validas por rifuĝintoj. La menciita tempospaco de dek jaroj ne estas postulita, se la fremdulo ek de minimume kvar jaroj havis sian daŭran loĝlokon sur la teritorio de la Respubliko kaj se ekzistas specialaj kaŭzoj por la koncesio de la ŝtataneco. En tiuj kazoj antaŭ la koncesio la Federacia Ministerio por Internaj Aferoj estas aŭskultenda de la koncesianta oficejo. Tute neniu tempospaco estas postulita kaj ankaŭ la demeto de la antaŭa ŝtataneco ne estas necesa, se la Federacia Registaro eldiras, ke la koncesio estas en la intereso de la Respubliko pro eksterordinaraj faroj de la fremdulo, precipe sur scienca, ekonomia aŭ arta kampo. En ĉiuj ĝis nun menciitaj kazoj de koncesio ne ekzistas subjektiva rajto de la fremdulo je la koncesio de la ŝtataneco; la kompetenta oficejo estas libera, agi laŭ bontrovo, sed ĝi devas konsideri la publikan intereson.

bb./ En la sekvontaj kazoj la fremdulo havas rajton je koncesio de la ŝtataneco; la kompetenta instanco do devas koncesii la ŝtatanecon, se ĉiuj laŭlegaj kondiĉoj estas plenumitaj;

kazo 1: La fremdulo havis en de minimume 30 jaroj seninterrompe sian daŭran loĝlokon sur la teritorio de la Respubliko kaj ne estas fremdulo pro antaŭa administracia forpreno de la ŝtataneco aŭ pro rezigno;

kazo 2: li havis dum minimume dek jaroj seninterrompe la ŝtatanecon, poste perdis ĝin pro alia kaŭzo ol pro forpreno aŭ rezigno, ek de tiam estas fremdulo kaj kiel tia havis dum minimume tri jaroj seninterrompe sian daŭran loĝlokon same la teritorio de la Respubliko;

kazo 3: li perdis la ŝtatanecon pro alia kaŭzo ol pro forpreno, kiam li estis ne memrajta /t.e. ne plenaĝa aŭ sub kuratoreco/, poste ek de tiam estas fremdulo kaj dum tempospaco de du jaroj post la akiro de memrajteco petas la koncesion;

kazo 4: li estas neplenaĝa kaj needzigita, ne estas fremdulo pro forpreno de la ŝtataneco, kaj la patro estas ŝtatano; se la patro mortis, se la edzeco de la gepatroj estas disigita aŭ nuligita, kaj ĉe nelegitimaj infanoj estas kondiĉo, ke la patrino devas havi la ŝtatanecon;

kazo 5: Fremdulino estis perdinta la ŝtatanecon per tio, ke ŝi aŭ edziĝis al fremdulo, aŭ kune kun sia edzo akiris la saman fremdan ŝtatanecon, aŭ dum sia edzeco kun fremdulo akiris ties ŝtatanecon, ŝi ek de tiam estas fremdulino, la edzeco estas disigita kaj ŝi petas la koncesion de la ŝtataneco dum tempospaco de du jaroj post la disigo de la edzeco.

En ĉiuj ĝis nun nomitaj kazoj 1 - 5 estas krome postulite, ke la petanta fremdulo plenumu la ceterajn ĝeneralajn kondiĉojn, kiuj validas ankaŭ por la

koncesio laŭ la bontrovo de la oficejo /ekz. ke li ne estu punita pro certaj deliktoj, ktp./

kazo 6: La ŝtataneco krome devas esti koncesiota al fremdulo, se li estas naskita sur la teritorio de la Respubliko, ek de sia naskiĝo estas sen ŝtataneco, havis dum minimume dek jaroj sian daŭran loĝlokon sur la teritorio de la Respubliko /minimume kvin el tiuj dek jaroj devas esti pasintaj seninterrompe ĵus antaŭ la koncesio/, se li ne estas kondamnita de aŭstra tribunalo pro certaj difinitaj krimoj kontraŭ la ŝtato, se li ne estas kondamnita de en aŭ eks-terlanda tribunalo je malliberejo de kvin jaroj aŭ pli, kaj se li petas la koncesion de la ŝtataneco post la plenumo de sia 18-a vivojaro /kaj plej malfrue unu jaron post la finiĝo de la patra povo aŭ de kuratoreco/; sed tiu tempospaco en neniu kazo finiĝas antaŭ la plenumo de la 21-a vivojaro.

cc./ Laŭ peto la koncesio de la ŝtataneco devas esti etendigata ankaŭ al la edzino, se ŝi ne estas fremdulino pro antaŭa administracia forpreno de la ŝtataneco. Krome la koncesio devas esti etendigata al la legitimaj infanoj de viro, al la legitimaj infanoj de virino /se ilia patro mortis aŭ la edzeco de la gepatroj estas disigita kaj la patrino havas la edukrajton/, kaj al la nelegitimaj infanoj de virino, en ĉiuj kazoj kondiĉe ke tiuj infanoj plenumas la ĝeneralajn kondiĉojn /nepuniteco ktp./ kaj estas neplenaĝaj, needzigitaj kaj ne estas fremduloj pro forpreno de la ŝtataneco.

ĉĉ./ Proceduro kaj kostoj. Por la koncesio de la ŝtataneco kompetentas la Landa Registaro de la koncerna federacia lando. La decido pri la peto devas esti farata en skriba formo. Kontraŭ la decido de la Landa Registaro, la plej alta administracia oficejo de la lando, ordinara apelacio al alia administracia oficejo ne estas allasebla. Tamen oni povas fari plendon ĉe la Administracia Kortumo en Vieno, se oni asertas, ke la decido estas kontraŭjura. Ankaŭ se la Landa Registaro dum tempospaco de ses monatoj ne decidis pri la peto, oni povas plendi ĉe la Administracia Kortumo. Se decidis nekompetenta oficejo, oni povas plendi ĉe la Konstitucia Kortumo /malobservo de konstitucie garantiita rajto/. La koncesio de la ŝtataneco kostas 4 800,-- aŭstr. ŝil. /2 400 steloj aŭ 192 Uŝ.-dol./; konsiderante la financon situacion de la petanto la oficejo povas malaltigi la koston ĝis 120,-- aŭstr. ŝil. /60 steloj aŭ 5 Uŝ.-dol./

## 2. Perdo de ŝtataneco

### a./ Laŭleĝaj kaŭzoj:

aa./ La ŝtatanecon perdas, kiu pere de sia peto, deklaro aŭ konsento akiras fremdan ŝtatanecon, se ne antaŭe la kompetenta aŭstra oficejo permesis al li la konservon de la aŭstra ŝtataneco; la konservo devas esti permesata en certaj kazoj.

bb./ Kune kun viro perdas la ŝtatanecon ties neplenaĝaj needzigitaj legitimaj infanoj; kune kun virino perdas la ŝtatanecon ties neplenaĝaj needzigitaj infanoj, se ilia patro aŭ kuratoro konsentis. Tiuj du reguloj respektive validas por la kazo, se laŭ la juro de la ŝtato, kies ŝtataneco estas akirota, la infanoj sekvas al la ŝtataneco de la patro aŭ de la patrino.

cc./ Nelegitime naskita ŝtatano perdas la ŝtatanecon, se li estas legitimigata per la geedziĝo de siaj gepatroj, li en tiu tempopunkto estas ankoraŭ neplenaĝa kaj needzigita, se plue en tiu tempopunkto lia patro havas alian ŝtatanecon kaj

se per la legitimigo, la legitimito akiras la ŝtatanecon de sia patro aŭ ĝin jam posedas.

ĉĉ./ La ŝtatanecon perdas, kiu propravole militservas por alia ŝtato.

ĉĉ./ Ŝtatano povas rezigni je la ŝtataneco, se li posedas fremdan ŝtatanecon kaj ne estas kulpigito en punproceso pro difinitaj deliktoj. Kromaj kondiĉoj rilatas al la servodevo en la armeo. Se la ŝtatano jam minimume dek jarojn seninterrompe havis sian daŭran loĝlokon ekster la teritorio de la Respubliko, li en ĉiu kazo povas rezigni je la ŝtataneco, kondiĉe ke li posedas fremdan ŝtatanecon.

b./ Perdo per administra decido:

aa./ Al ŝtatano, kiu estas en la publika servo de alia ŝtato, devas esti forprenata la ŝtataneco, se li per sia konduto grave malutilas al la interesoj aŭ al la reputacio de la Respubliko.

bb./ Plue la ŝtataneco devas esti forprenata, se la ŝtatano akiris la ŝtatanecon antaŭ pli ol du jaroj per koncesio kaj se li proprakulpe konservis fremdan ŝtatanecon. Tiu regulo ne estas aplikebla al rifuĝintoj, al personoj, kiuj akiris la ŝtatanecon en la intereso de la Respubliko kaj al edzinoj, al kiuj estis etendigata la koncesio de la edzo.

3. kaj 4. Reguloj pri familioj kaj pri duobla ŝtataneco.

Tiuj reguloj principe esprimiĝas en la reguloj pri akiro kaj perdo de la ŝtataneco, kiuj ĵus estas traktitaj.

5. Aliaj problemoj.

Montriĝis, ke en la pasinteco la oficejoj estis tro facile pretaj, koncesii la ŝtatanecon al eksterlandanoj sen sufiĉe konsciencie esplori la plenumon de ĉiuj kondiĉoj. Tiel povis okazi, ke diversaj eksterlandaj milit-krimuloj ricevis la aŭstran ŝtatanecon, kio certe ne estas en la intereso de la Respubliko. /Temas precipe pri la gefratoj Mauer, kiuj antaŭe estis polaj ŝtatanoj, kaj pri Jan Verbelen, kiu kiel belga ŝtatano en Belgujo estis kondamnita je morto pro murdo./

6. Ĝenerala signifo de ŝtataneco.

Diversaj rajtoj, kiel la balotrajto aŭ principe la rajto servi kiel publika oficisto, estas rezervitaj al ŝtatanoj. Pluraj fundamentaj rajtoj kaj liberecoj estas garantiitaj nur al ŝtatanoj. Aliaj homaj rajtoj validas ankaŭ por fremduloj, ekz. la libereco de la persono kaj de la loĝejo /t.e. la protekto kontraŭ arbitraj arestigoj kaj traserĉadoj de la domo/, la rajto direkti peticiojn al publikaj instancoj, la rajto libere esprimi sian opinion, la libereco de kredo kaj konscienco ktp., plue la rajto je proceduro antaŭ la kompetenta oficejo. En la juĝeja kaj administracia proceduroj kaj same en la privata juro la fremduloj estas principe egalrajtaj. Laŭ la puna kodo la fremduloj estas punendaj pro ĉiuj krimoj kontraŭ la aŭstra punjuro, kiujn ili faras en Aŭstrio mem; pro krimoj faritaj en eksterlando ili estas punendaj, se la krimo direktas sin kontraŭ la aŭstra ŝtato, aŭ - escepte en la kazo de transdono al eksterlando - se la krimo estas punebla kaj laŭ eksterlanda kaj laŭ aŭstra juroj.

D-ro Klaus Perko

- Graz -



Publikaj Kunvenoj de IEAJ, al kiuj estas invitataj ĉiuj membroj de la Asocio kaj kongresurbaj juristoj-neesperantistoj por pritrakti komparjuran temon, okaze de la Universalaj Kongresoj:

Mainz /Germanujo/, 1958: Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj,

Bruxelles /Belgujo/, 1960: La pozicio de advokato en diversaj landoj,

Harrogate /Britujo/, 1961: La respondeco de la aŭtoposedantoj,

København /Danlando/, 1962: Evoluoj en la Soveta Juro /1958-1962/,

Den Haag /Nederlando/, 1964: La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj,

Budapest /Hungarujo/, 1966: La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj.

Rotterdam /Nederlando/, 1967: La ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj.